



« LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE » SALUTAS VIN !



Bonvenigaj vortoj

Bonan jaron 2023 por ĉiuj homoj sur la tero

Enhavo

- Sarta historio pri esperanto
- Kio nova en nia retejo ?
- Lokaj aktualaĵoj pri Eo
- Historio pri Sablé kaj « Les Sablés »



Sarta historio pri Esperanto

Gaston Waringhien 1901-1991



Gaston WARINGHIEN, naskiĝis la 20-an de julio 1901 en Lille, mortis la 20-an de decembro 1991 en Parizo.

Li estis franca profesoro kaj grava vortaristo, gramatikisto kaj historiisto de Esperanto.

Li aperigis verkojn sub la pseŭdonomoj Georges E. Maura, A. Nurak, kaj A. Papadiamantopoulos.

Waringhien estis profesoro interalie en la universitato de Tours kaj liceo Lakanal (Sceaux). Li kunlaboris al Grand Larousse Encyclopédique

Waringhien gvidis kursojn pri Esperanto, verkis kaj tradukis. Li estis prezidanto de la Akademio de Esperanto de 1963 ĝis 1979. Li estis kunredaktoro de Literatura Mondo kaj ĉefredaktoro de La Nica Literatura Revuo. Li multe tradukis poezion, ĉefe el la franca, sed ankaŭ el la angla kaj la germana, kaj kontribuis al la Angla Antologio. Li estis vortaristo kaj inter la projektoj kiujn li prilaboris estas la Plena Vortaro (1930 kaj postaj eldonoj), la Plena Ilustrita Vortaro (1970), kaj la Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Granda Vortaro Esperanta-Franca) (1957).

Plie, li estas la aŭtoro de Plena Gramatiko (1935), poste nomita Plena Analiza Gramatiko (5a eld. 1985), kun Kálmán Kalocsay. (fonto : wikipedia)

Li estas entombigita apud sia edzino en la urbeto Aigné, situanta 15 km for de le Mans.

En 2001, okaze de lia centa naskiĝdatreveno kaj de la deka datreveno de lia forpaso nia grupo organizis esperanto-aranĝon en Aigné kaj poste la biblioteko ricevis novan nomon : Biblioteko Gaston Waringhien.

« Je la aĝo de 15 jaroj Gaston Waringhien elkovris la ekziston de Esperanto, tiu mirinda komunikilo. [...] »

Tiel Gaston Waringhien estas la aŭtoro de nia plej bona vortaro, tute en Esperanto, disvastigita en la tuta mondo, kaj de nia plej kompleta gramatiko. Tiel, li tradukis la verkojn de Charles d'Orléans, de Baudelaire, de Heredia, de Gérard de Nerval, se citi nur kelkajn, kaj tiel ege kontribuis al la disvastigo de la franca kulturo en eksterlandon. Mi aldonu, ke li estis vera Eŭropano, antaŭ la naskiĝo de la eŭro, tradukante ankaŭ el la angla, el la germana, el la itala, kaj eĉ el la persa.

Fine dum preskaŭ dudek jaroj Gaston Waringhien estis prezidanto de la Akademio de Esperanto, en kiu li gvidis sciencajn studojn pri kelkaj punktoj de gramatiko kaj de leksiko.

*Jen do, tute nekomplete kelkaj vortoj pri la homo, kiun ni honoras hodiaŭ. Homo, kiu ja meritas la nomon, kiun ni donas al li, **Heroldo de Esperanto.** »*

A.cherpillod, teksto dirita omaĝe, en Aigné, la 8^{an} de decembro 2001. (fonto : Gazeto n°40 de la GEM)

LOKA HISTORIO PRI LA KUKETOJ « *les Sablés de Sablé-sur-Sarthe* »

Kial oni nomas "sablée" tiun paston?

La butero estas malvarme miksitaj kun la faruno kaj la sukero. Tiel, la butero ĉirkaŭas ĉiun eron de faruno kaj de sukero, kaj post kuirado eroj ne estas tute kunigitaj. Tio faras sablan teksturon: teksturon iomete kiel sablo.



Kial oni nomas "sablé de Sablé" tiun kuketon ?



Madeleine de Souvré
Markizino de Sablé
1599-1678

En la franca, la vorto "sablé" signifas "el sablo" kaj estas ankaŭ la nomo de malgranda urbo : Sablé-sur-Sarthe.

Laŭ la Leteroj de la fama verkisto la markizino de Sévigné, tiu biskvito estis kreita en 1670 en la urbo Sablé-sur-Sarthe.

Oni diras, ke Madeleine de Souvré, markizino de Sablé estus alportinta al la kortego de la reĝo Ludoviko la 14-a malgrandajn sekajn rondajn biskvitojn, kiujn Sinjoro (tiel oni nomis la fraton de la reĝo) taksis tre taŭgaj kaj bongustaj. Li ordonis al la fama ĉefkelnero Vatel ke de nun oni servu al li por matenmanĝi tiujn "malgrandajn sablés" tiel nomitajn omaĝe al la markizino de Sablé.

Ĝis nun, oni kuiras kaj vendas « sablés de Sablé » en la regiono.

Philippe d'Orléans
« Sinjoro »
Frato de la reĝo
Ludoviko la 14a
1640-1701



François Vatel
Ĉefkelnero
1631-1671



Nun, tiuj famaj kuketoj vojaĝas tra la mondo per la pletoj proponitaj en francaj aviadiloj AIR FRANCE

Kial tiu urbo nomiĝas "Sablé sur Sarthe"?

La rivero Sarthe fluas ĉe Sablé-sur-Sarthe. Ĝia akvo malrapidiĝas, ĉar estas kunfluejo, kaj tuj post ĝi la rivero turnas maldekstren kaj larĝiĝas. Tiel, la fluo malrapidas kaj la transportitaj sableroj estis forlasitaj funden. Por ke la boatoj ne grundu sur sablotavolo antaŭ la haveno, necesas fosi temp'al tempe.



Laŭ la rivero Sarthe ĉe Sablé

Maksimo de Madeleine de Souvré

*« Per la koncizeco de la
interparolo, oni gajnas kion oni
perdas per la troeco de paroloj »*

Nia Zamenhofa Tago 2022

La 15-a de decembro estas grava tago por la tutmondaj esperantistoj. Ĝi estas la « Zamenhofa tago » kiu memorigas la naskiĝtagon de Doktoro Zamenhof, inicianto de la lingvo Esperanto. Li naskiĝis en Bjalistoko la 15-an de decembro 1859 en iu regiono kie regis daŭra malamikeco kaj kie kvin lingvoj estis parolataj. Tiu altkvalita homo pasiĝis pri la konceptado de iu lingvo interkomprenebla de ĉiuj homoj por paca unuiĝo.

Ĉiuj esperantistoj memoras la valoron de tiu homo. La 15^{an} de decembro, en la departemento Sarthe, nia klubo kunvenis por tagmanĝi en la kromkonstruaĵo « Café des Moines », Kafejo de Monaĥoj de la Abatejo « Epau », memorebla loko de nia urbo « Le Mans ».



La Abatejo « Epau »



En la Kafejo de Monaĥoj, apud la Abatejo

Post la tagmanĝo, ni plezure vizitis ege interesan ekspozicion priskribanta la vivon de la Reĝino Berenĝer el Navaro, heredant-vidvina grafino de la provinco « Maine ».

Tiu reĝino fondis la Abatejon « Epau » en 1219, kie nun situas ŝia kuŝostatuo. Tiu vojaĝema reĝino tamen estis tre ligita al « le Mans ».



Kuŝostatuo de la reĝino « Bérengère »

La ekspozicio prezentas valoran historian temon pri nia urbo dum la 12^a kaj 13^a jarcentoj.



La Grupo Esperanto de « le Maine » ŝatis tiun tagon kiu pli proksimigis ambaŭ memorojn.

